

Eŭropa Bulteno

Majo 2018, Numero 181

ESPERANTO – TUTMONDE LIGITA



Preskaŭ 200 Esperanto-parolantoj kunvenis dum la pentekostaj tagoj en Zweibrücken apud la german-franca landlimo. Estis trilanda kongreso kun la partopreno de la franca, germana kaj luksemburga asocioj kaj gastoj el aliaj landoj. Necesis venki kelkajn organizajn defiojn: la altlernejo tie tre taŭgis por la eventoj de la kongreso, sed situas ekster la urbo. Prizorgi manĝojn kaj trinkaĵojn do aldoniĝis al la taskoj de la organizantoj. Sed ĉio bone finiĝis, kaj dum la konkluda kunveno eĉ aŭdiĝis laŭdo por la kvalito de la manĝoj. Partoprenis pluraj libroservoj kun oferto simila al tiu de Universala Kongreso, okazis laborkunsidoj kaj jarĉefkunvenoj de partoprenantaj asocioj, krome deko da fakaj kunsidoj kaj prelegoj kun aŭ sen rilato al la kongresa temo “Esperanto – tutmonde ligita”. Podian diskutadon kaj retan elsendon pri “Esperanto kaj interreto” organizis dum unu vespero la teamo de movada-vid.punkto, Johannes kaj Eva. Kaj la duan vesperon muzik- kaj dancgrupoj pruvis la multkulturecon de la kongresurbo Zweibrücken, sekvataj de “La Kompanoj” el Francio kun kantoj de Jacques Brel en Esperanto.

La Reinhard-Selten-aŭlo (nomita laŭ la nobelpremiito kaj esperantisto, kiu mem iam prelegis en la altlernejo de Zweibrücken) dum tri tagoj fariĝis manĝejo, movada foiro kaj ĉefa renkontiĝejo de nia esperantista komunumo. Raportis lokaj gazetoj kaj la regiona televido, salutis la kongreson la ministroprezidantino de Rejnlando-Palatinato, la aganta urbestro de Zweibrücken, la urbestro de ĝia ĝemelurbo Boulogne-sur-Mer (bone konata al esperantistoj) kaj la prezidanto de la altlernejo, kiu mem partoprenis en la malfermo. Salutmesaĝoj venis ankaŭ de Margaret Zaleski-Zamenhof kaj de la UEA-prezidanto Mark Fettes.

Kadre de la kongresa temo ni diskutis kiel rilatigi nian propran tutmondecon – evidentan por esperantistoj jam dum 130 jaroj – kun la tutmondiĝo, kiun hodiaŭ ofertas la interreto kaj sur

ĝia bazo aro da modernaj komunikiloj. Neniam estis pli facile informiĝi pri Esperanto (kaj pri ĉio alia), neniam pli facile eklerni nian lingvon (same kiel aliajn). En sia prelego Chuck Smith (kunfondinto de la Esperanto-Vikipedio, la Esperanta versio de la interreta kurso Duolingo kaj de la reta ligilo Amikumu) raportis pri la progreso de Esperanto en la reto. Li ankaŭ donis ekzemplojn, kiel el la reto povas fariĝi komunumo, kiu reale kunvenas kaj organiziĝas. Interesa aspekto: tio okazas ĉefe en Usono, ĝis nun ne konata kiel centro de esperantista vivo. Alian agadkampon gravan por ni pritraktis Seán Ó Riain en sia enkonduka prelego. La prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio raportis pri ties ĉefaj okupoj: informi pri la propedeŭtika valoro de Esperanto kaj ĝia kapablo kontribui al multlingveco en Eŭropo – do al deklarita celo de la Eŭropa Unio – kaj pri ĝia ebla kontribuo al la kreiĝo de eŭropa identeco. Ambaŭ temoj rilatigas la internacian lingvon al la aktuala debato pri stato kaj estonteco de la Eŭropa Unio: Esperanto ne staras flanke, sed povas esti parto de la solvo. La avantaĝojn de nia lingvo komencas malkovri ankaŭ interesa celgrupo, pri kiu en Zweibrücken raportis Chuck Smith kaj Charlotte Scherping Larsson: la multlingvuloj, kiuj de kelkaj jaroj kunvenas en “Polyglot Gatherings”. La fakto ke inter ili 20-30 procentoj jam parolas kaj uzas Esperanton estas bela pruvo ke nia lingvo ne celas anstataŭi aliajn, sed male subtenas multlingvecon kaj lingvan egalrajtecon.

La decida demando por mi post tia evento estas: ĉu valoris la multan laboron, kaj kiel ni nun daŭrigu? Mi foje aŭdis la argumenton ke en la hodiaŭa interreta mondo kongresoj ne plu estas bezonataj (same kiel lokaj grupkunvenoj kaj entute la ekzisto de Esperanto-asocioj). Mi ne konsentas kun tiu argumento: kunvenoj necesas jam pro statutaj kialoj, kaj vivanta lingvo almenaŭ jen kaj jen bezonas esti parolata en la reala mondo. Krome geamikoj volas havi okazon renkontiĝi, kaj kongresoj ĉiam estas bonaj okazoj por atentigi la reston de la mondo ke ni ekzistas, eĉ kreskas. En ideala kazo ni revenas de kongreso kun nova optimismo. Laŭ ĉiuj kriterioj la kongreso en Zweibrücken valoris la penon. Grandan dankon al la LKK kaj ĉiuj aliaj, kiuj ĝin helpis organizi! Kaj ĝis revido post unu jaro proksime al nia norda limo en Neumünster.

Ulrich Brandenburg (Esperanto – aktuell)

INFORMOJ EL RUMANIO



Okaze de la Internacia Tago de la Libro, kadre de la jara projekto “Biblioteca te citeste”(biblioteko legas vin), Distrikta Biblioteko “Dinicu Golescu” Arĝeș kaj Teknologia Liceo “Dacia” en urbo Pitești, organizis sesion “Publika Legado” rumana-Esperanto, mardon la 24-an de aprilo 2018 je la 16:00 horo en klasĉambrego. Invititoj estis s-ro Marian Vochin el Bukureŝto, historiisto de la rumana esperantista movado kaj s-ro Cristian Sabaŭ, ĵurnalisto kaj esp.tradukisto en urbo Pitești. Ĉeestis ankaŭ la verkistinoj

Denisa Popescu-televida ĵurnalistino kaj Simona Liutiev-profesorino.

Rumana televido Antena 1 Pitești invitis rumanan esperantiston Marian Vochin partopreni ĉe televida disaŭdigo "Draga Personaj Principal" (kara ĉefa persono), la 27-an de aprilo 2018 je la 16:00 horo, kie li estis intervjuita de s-ino Denisa Popescu, televidĵurnalistino kaj verkistino, pri la lingvo Esperanto, L.L.Zamenhof, esperantista movado en Rumanio kaj la persona esperantista vivo. La rumanlingva intervjuo estas spektebla ĉi tie:

https://m.facebook.com/story.php?story_fbid=990641411100035&id=100004625562599

Marian Vochin

ATINGOJ DE GEA-FILIO POR KLERIGADO KAJ KULTURO KUN ESPERANTO-CENTRO HERZBERG



Preskaŭ ĉiuj Esperanto-parolantoj, almenaŭ en Germanio scias, ke dank' al multjardeka dura kaj konstanta laborado ni en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo atingis multe kaj publike kaj principe daŭripove je favoro por Germana Esperanto-Asocio kaj la Esperanto-movado (inkl. retgestudentoj).

Nenie en la mondo okazis tiom da pozitivaj evoluoj por nia internacia lingvo Esperanto. Se vi volas, ni povos sendi al vi mirindan "Esperanto-povumkatalogon". Eĉ ni atingis unikan "Alleinstellungsmerkmal" urba

monumento). Bv. foje legi ekzemple en Vikipedio pri tio! Nia teamo, kiu laboradas, ankoraŭ estas malgranda. Ekzemple Petro Zilvar provas helpi per honorofica laborado je favoro por Esperanto de almenaŭ 70 horoj ĉiusemajne. Je daŭro tio ne estas saniga afero kaj oni mem ne povas plenumi la propran privatan taskaron.

Kion ni atingis?

- 1) Konstantan kunlaboron (preskaŭ ĉiutage ion por fari) kune kun nia urba gvidantaro. Tio estas vere ĝojiga.
- 2) Ni havas bonajn kontaktojn kun multaj aliaj asocioj, ktp.
- 3) Dank' al la urbo ni havas ejojn, ekz. en la urba biblioteko, sur la Esperanto-platfomo en la Kastela muzeo, arkivejojn en la malnova urbodomo kaj en baza lernejo.
- 4) Multajn realigendajn, parte urĝajn farendajojn kaj multajn ideojn kaj penadojn (do ne estas stagnado, ĉiam funkcias vera movado.
- 5) Ekzistas jam pli ol 200 publikaj tabuloj, ŝildoj, vojmontriloj, informtekstoj aŭ dulinge aŭ tute en Esperanto.
- 6) En multaj, eĉ eksterlandaj gazetoj kaj aliaj medioj aperas artikoloj kun tekstoj pri la "reala atingajo Esperanto-urbo".
- 7) En Herzberg intertempe troviĝas unu el la plej grandaj Esperanto-bibliotekoj kun multaj specialaj kulturvaloraĵoj.
- 8) Ni jam havis gastojn el pli ol 75 landoj.

9) Por la estonteco ekzistas kaj ekzistos multaj favoraj bonŝancoj, ktp.

Tamen Esperanto per la Esperanto-Centro en la Esperanto-urbo Herzberg bezonas urĝe kompetentajn kaj kunlaboremajn gehelpantojn por multaj branĉoj. Ni restas optimistoj kaj pensas, ke en la Esperanto-movado ekzistas homoj, kiuj transprenas partajn respondecojn aŭ kiuj kunzorgas por la financado, mastrumado, ktp. Konstante ni parolas Esperanton, ofte estas gastoj, okazas festoj, ekskursoj, ktp.

Jen kelkaj ekzemploj rilate al konstantaj laborofertoj:

- 1) Kunvarbado kaj informado
- 2) Projektoj kaj financado
- 3) Arkiv- kaj bibliotekaj laboroj
- 4) Sekretariaj taskoj
- 5) Mastrumado de la diversaj ejoj
- 6) Tradukado, ekz. por regionaj tekstoj, Vikipedio, Nacia Parko Harz
- 7) Informado kaj klerigado de / per GEA-Filio por Klerigado kaj Kulturo en Herzberg
- 8) Ordigado de la GEA-gazetarkivmaterialoj
- 9) Diversaj kulturprojektoj, novaj tamen realigeblaj ideoj
- 10) Klubo, Interkulturaj vesperoj, poliglota agado
- 11) Flugfolioj, fakaj kajeroj, libroeldonado
- 12) Varbbroŝuroj, bildkartoj, filmado
- 13) Hejmpaĝo kaj modernaj informservoj
- 14) Interlaboroj kaj kontaktoj kun aliaj asocioj, kulturinstancoj, reprezentado ĉe partioj, ktp.
- 15) Helpado por preparado de publikaj fakekspozicioj
- 16) Aktivecoj, ekz. en la urba biblioteko kun granda "Esperanto-libroangulo"
- 17) ... kaj multaj aliaj taskoj en la vivanta "Esperanto-urbo".

Mi jam pensas pri faka kuratoraro de la Esperanto-Centro kaj aliaj praktikaj organizmodeloj. Jam estas la unuaj interesiĝantoj. Bv. senpre/rekte kontakti Petro Zilvar.

Petro Zilvar

UEA ELEKTIĜIS EN GVIDAN NEREGISTARAN GRUPON ĈE UNUIĜINTAJ NACIOJ

Rezulte de diplomaciaj elpaŝoj en Novjorko kaj Ĝenevo, UEA elektiĝis por trijara periodo en la estraron de internacia kunordiga grupo de neregistaraj organizoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj, konata per la mallongigo CoNGO (pron. "kongo"). Pli formale "La Konferenco de NRO-oj en Konsultaj Rilatoj kun UN", CoNGO funkcias kiel tegmenta asocio por pli ol 500 organizoj kiuj tenas konsultajn rilatojn kun ECOSOC, la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj. La celo de CoNGO estas faciligi la partoprenon de NROj en la UN-sistemo kaj kunlabori kun UN por komunaj celoj, ekzemple la Celoj por Daŭripova Evoluigo.

UEA jam delonge estas membro de CoNGO kaj partoprenas en ties kunvenoj kaj laborgrupoj. Lastatempe ĝi aparte aktivis en du komitatoj de CoNGO, pri paco (Vieno) kaj pri edukado (Novjorko), kaj krome akiris bonan reputacion en Ĝenevo pro siaj intervenoj en diskutoj pri homaj rajtoj. Surbaze de tiu longdaŭra kunlaboro, dum sia marta jarkunveno en Ĝenevo la membroj de CoNGO elektis UEA al sia estraro por la periodo 2018-2021.

Kiel estrarano de CoNGO, UEA kunlaboras kun 17 aliaj grandaj internaciaj NROj, sub la gvido de prezidanto Liberato Bautista, kiu laboras en Novjorko. Inter aliaj asocioj-estraranoj troviĝas *Soka Gakkai Internacia*, la *Internacia Alianco de Virinoj*, *Soroptimist International*, *Internacia Humanista kaj Etika Unio*, kaj *Internacia Unio de Psikologia Scienco*. La estraro kunvenas rotacie en Novjorko, Ĝenevo kaj Vieno, kie UEA estas reprezentata de, respektive, prof. Humphrey Tonkin, Stefano Keller, kaj prof. Hans-Michael Maitzen.


“Kunlaboro kun aliaj internaciaj asocioj estas grava elemento en la strategio de UEA pri Konsciigo,” komentas d-ro Mark Fettes, la Prezidanto de UEA. “Tio gajnas por ni amikojn, donas okazojn por trejni niajn aktivulojn, kaj malfermas pordojn al komunaj projektoj en kiuj Esperanto ludas gravan rolon. Mi gratulas niajn reprezentantojn, ke ili tiel bone preparis la vojon al ĉi tiu signifplena atingo. Ni energie plukonstruos sur ĝi!”

Gazetaraj komunikoj de UEA

KONTROLA VIZITO AL LERNEJOJ EN KIUJ ESTAS INSTRUATA ESPERANTO



En majo 2018 mi kiel ĉefaŭtoro de la ideo pri eŭropa projekto Multlingva Akceliko, interkonsentis kun du elementaj lernejoj en Zagrebo (Kroatio) kaj Ŝentilj (Slovenio) viziti la instruerojn pri Esperanto. La projekto en sia unua jaro antaŭvidis provan instruadon de unu triono de la propedeŭtika kurso de Esperanto (Multlingva Akcelilo) en tri elementaj lernejoj en Kroatio, Slovenio kaj Bulgario (Vraca) kiu okazis en marto, aprilo kaj majo gvidataj de lernejoj instruistinoj pri fremdlingvoj kiuj ne konas Esperanton. Ili instruas laŭ la instrukcioj de la projekto uzante didaktikaĵojn kiuj por tio estis kreitaj. La plano estas ke post tio la instruistinoj raportu pri siaj rimarkoj: kio en la kurso tre bone funkciis, kio malpli kaj kio eventuale ne estas efektivebla. Tiujn raportojn oni pridiskutos en la dua renkontiĝo de



projektpartneroj en Bratislavo la 20-an de septembro kaj baze de ili kreos definitivajn version de la didaktikaĵoj por la instruprogramo.

Mi ne povis iri al Bulgario, sed mi vizitis la kursojn post 10 unuaj lernohoroj en Zagrebo kaj Ŝentilj. Mi estis tre kontenta pri la maniero kiel faras tion la instruistinoj kaj pri la rezultoj. En Zagrebo ĉio estis bonega, sed en Ŝentilj la infanoj havis problemon pri parkerado de novaj vortoj – unu el la centraj problemoj de ĉiu fremdlingva instruado. Zagrebanoj aplikis tre bonan manieron solvi tion, kion ni enmetos en ĉiujn estontajn kursojn. Aliajn rimarkojn kaj diskutindaĵojn mi aperigos post kiam mi ricevos skribajn raportojn de ĉiuj tri lernejoj.

Zlatko Tišljarić

TRIA PARTO EL LA LIBRO »IDENTECOJ«

KIEL EKESTAS GRUPIDENTECOJ KAJ KIUJ ESTAS ILIAJ KARAKTERIZOJ

Kiel jam dirite, ekzistas spontanee ekestintaj grupidentecoj kaŭze de fido al aliaj personoj, kiam temas pri malgrandaj grupoj en kiuj ĉiu konas ĉiun membron. Ekzistas ankaŭ identecoj de grandaj grupoj en kiuj oni ne konas ĉiujn membrojn kaj tiuj ne ekestas spontanee sed per edukado, do per transdono de grupvaloroj al unuopulo pere de sociaj institucioj.

Per interesa ekzemplo mi montros, kiel ekestas spontanee grupidenteco. Iam mi – jam kiel pli aĝa sinjoro – devis esti operaciita pro polipoj en la nazo kaj oni metis min en komunan hospitalĉambron kun 7 junuloj. Ĉiuj faris kosmetikoperacion de nazo por plibeligi ĝin, kaj hazarde ĉiuj venis en la ĉambron aŭ en tago antaŭa aŭ samtage kiel mi. Unuj estis operaciitaj en la tago de mia alveno kaj aliaj kiel mi en la posta tago. Post du tagoj ĉiuj jam tre bone fartis, nenio plu doloris nin, sed pro eventuala ŝanco ke estiĝu iuj postoperaciaj komplikajĵoj ni ĉiuj devis resti ses tagojn post la operacio en la hospitalo. Do, la trian tagon por la junuloj la restado estiĝis teda. Temis pri junuloj kiuj antaŭ la enhospitaliĝo neniam vidis unu la alian. Inter ili do ekzistis neniu antaŭa ligo. Unue ili komencis interparoli kaj interkonatiĝi. Tiam ili komencis kartludi kaj ekestis koalicioj kaj rivalecoj. Baldaŭ unu el la junuloj diris: »Knaboj, ni premu la butonon por inviti la flegistinon kaze de urĝa bezono!« Kelkaj tion kun ĝojo tuj akceptis (fine okazos io amuza) sed kelkaj kontraŭstaris. Sed tiu kiu faris la proponon tuj atakis ilin: »Kio vi estas? Malkuraĝuloj? Timeguloj!« Kaj li persvadis ilin por akcepti la

proponon. Kiam ĉiuj konsentis unu el ili premis la butonon. Venis zorgigita flegistino sed ili ĉiuj ridegis. La flegistino foriris kolera. Ili daŭrigis kartludi. Kaj la iniciatanto proponis ke la aferon ili ripetu. Ĉi-foje protestis nur ankoraŭ du junuloj. Rapide li silentigis ilin dirante ke ili estas senutiluloj, ke ili timegas kaj ke ili ne meritas esti membroj de la societo. Denove ili premis la butonon. La flegistino venis kaj kompreninte ke ili ludas, ŝi elŝaltis la sistemon por urĝa helpopeto. Je la propono de nun jam evidente memproklamita gvidanto (kaj de aliaj akceptita) ili serĉis en la koridoro kie ŝi malŝaltis la sistemon kaj rekonektis ĝin. Ili ripetis la butonpremon la trian fojon. Vi povas pensi kiom kolera estis la flegistino ĉi-foje kriegante al ili. La sekvan matenon je la 6-a horo matene ŝi venis kaj disdonis termometrojn por mezuri la temperaturon de ĉiuj pacientoj. Kiam ŝi foriris, la gvidanto tuj proponis: Ni ĉiuj metu la termometrojn en varmegan akvon ke ni ĉiuj havu 40- gradan temperaturon. Kontraŭ protestantoj ĉi-foje li tute ne plu estis milda. Per blasfemoj li atingis tion, ke ĉiuj faris tion kion li proponis. Kiam la flegistino revenis kaj vidis ke ĉiuj havas tiel altegan temperaturon, ŝi estis unue ŝokita, sed kiam ili komencis ridegi, estis al ŝi tuj klare kio okazis. Tiel okazadis dum pliaj du tagoj ĉiutage iu nova friponaĵo ĝis ili foriris el la hospitalo. Min dum la tuta tempo ili ne inkluzivigis. Mi estis pli aĝa sinjoro kiu ne enmiksigis en iliajn ludojn kaj ne ĝenis ilin. Kiam ili disiradis ili estis plenaj de planoj kaj interkonsentis pri rendezuo en la urbo. En tiaj kazoj ni plenkreskuloj konkludas ke la gejunuloj estas misedukitaj, ke mankas al ili kultureco en la konduto kaj tial ili faras friponaĵojn. Sed mi konkludis ke tute hazarde mi ĉeestis en grava prezento de tio kiel ekestas nova grupidenteco.

Kiam homoj kunestadas jam post unua tago komenciĝas procezo de ekesto de grupo. Unue inter ili aperas unu aŭ kelkaj kiuj deziras transpreni la rolon de gvidanto. Kiam estas pluraj, inter ili ekestas interbatalo ĝis unu el ili venkas kaj ĉiuj akceptas lin kiel estro. Samtempe komenciĝas la procezo de reciproka pliproksimiĝado per komunikado, kiun startigas la gvidanto kun la celo fortigi la grupidentecon. De la grupmembroj li postulas ke ili faru ion kio por individuo estas danĝera sed per tio ĉiu pravas ke la aparteno al la grupo por li estas pli grava ol la propra sekureco. Tio ripetiĝas tiom longe ĝis ĉiuj montras profundan apartenon al la grupo kaj pretecon oferi sin por la grupo kaj fidi al la estro sen dubi pri lia kapablo gvidi. Se la prezentita grupeto ekzistus plu, baldaŭ formiĝus strategioj por atingi grupcelojn, manieron de funkciado kaj pluekzisto kaj samtempe pliprofondiĝadus la grupidenteco tra evoluo de la propra grupideologio. Je la ekzemploj de ilia propra historieto, la estro plu konvinkadus la membrojn ke ilia grupo estas grava (ĝi estas pli bona ol aliaj grupoj - li prezentus argumentojn per ekzemploj de iliaj agoj ktp.).

Do, ni povas konkludi: Individuoj kiuj antaŭe ne konis sin, fariĝas en mallonga daŭro de kunestado grupo kun grupidenteco, en kiu ili kontentigas siajn bezonojn kiel sociaj estaĵoj. Dum la procedo de grupestiĝo kreskas socia organismo kun socia hierarkio, en kiu estro gvidas la laboron kaj elektas celojn de la grupo. En la grupo unuopuloj aktivigas tiun parton de sia genetika plano, pro kiu ili racie kaj emocie reagis alimaniere ol tiam kiam temas pri individuaj bezonoj. Ekestas interrilatoj, pro kiuj individuo estas preta oferi sin por aliaj en la grupo aŭ por la grupo kiel tuto.

Se tia spontanee ekestinta grupo vivas pli longe kune, ĝi evoluigas la proprajn strategiojn por travivi kaj tiam ĉe la homoj evoluas ideologio, kiu fortigas la grupan identecon (apartensenton). Grupo nome devas evoluigi regulojn de reciproka kondutado, kiun ni nomas moralo. Por konvinki ĉiujn grupanojn ke ili devas akcepti certajn regulojn kaj sian pozicion en la socio (grupo), la estroj evoluigas ideologiojn. Ideologio estas aro da ideoj, kiuj klopodas klarigi kial unuopulo vivas, kial li ekzistas. Ideologio kiel respondo al tiu baza filozofia demando kiun al si starigas ĉiu homo estas gluaĵo kiu unuopulon ligas al la grupo kondiĉe ke

li akceptis la ideologion kiel absolutan veron kaj pri kiu li neniom dubas. Unuopuloj kiuj akceptas ideologion sen plej eta ero da dubo estas la plej feliĉaj, ĉar ili ricevis la respondon al la demando »Kial mi ekzistas?« - »Mi estas ĉi tie por servi al mia grupo«. Sed kutime en la vivo estas tiel ke realiĝas situacioj kiuj enportas en la homon dubon pri la ideologio kaj ideologia dogmaro. Se oni instruis vin ke vi devas sensuspekte obei la estron (ekz. patron en familio), ĉar li estas la plej saĝa kaj la plej bona kaj ĉar li scias plej ĝuste solvadi problemojn kaj gvidi la familion, sed aliflanke vi vidas ke la patro ebriiĝadas, estas senrespondeca, batas vin senkaŭze, vi devas ekdubi pri la ideologio. Pro tio inter ĉiuj grupanoj nur kelkaj akceptas la ideologion komplete, dum la aliaj akceptas ĝin kun pli aŭ malpli da dubo. Do ilia preteco sin oferi por aliaj en la grupo ne estas absoluta, ĝi estas diference intensa.

Por ke ĝi laŭeble longe ekzistu, devas ĉiu grupo senĉese fortigi la grupidentecon per adaptado de la ideologio, ĉar ĝi povas esti sukcesa nur tiam kiam la plimulto de anoj estas konvinkita pri la ĝusteco de la ideologio kaj pri la aparta graveco kaj rolo de la propra grupo. En etaj grupoj kiel la familia evoluas grupa familia ideologio: la patro aŭ ambaŭ gepatroj edukas la infanojn tiel ke ili devas obei certajn regulojn pri konduto kaj komuna vivo kaj kiel labori (pere de ludoj komence), plenumi certajn taskojn. Ju pli aĝaj iĝas la infanoj, ĉiam pli da klarigoj ili bezonas (kial ili devus obei la patron, kial ili devas lerni, kial ili devas subiĝi al pli aĝaj personoj...) Kaj ne ekzistas objektivaj argumentoj por klarigi la kialojn. Ĉar ankaŭ la reguloj de familio al familio varias, ne ekzistas objektivaj klarebla moralo, kiu vere estus absoluta kaj kiu povus definitive klarigi kio estas bona kaj kio malbona.

La nura maniero por tio estas ke la estro (aŭtoritatulo) evoluigu familian ideologion, kiu baziĝas je konvinkigaj legendoj kaj duonveroj. La patro instruos al ni, ke nia familio estas tre grava, ĉar ni konstruis pli grandan domon ol aliaj, ĉar ni havas pli da mono, antaŭ ĉio pro tio ĉar la praavo estis generalo en aŭstra armeo, aŭ la praavino havis nobelan devenon, aŭ la praonklino estis fama baletistino, aŭ ĉar la plej aĝa frato estas sukcesa sportisto en la lernejo... Do, la ideologio fontas el historio kiu plej ofte estas ligita al nepruveblaj legendoj kaj elpensitaj okazaĵoj, pro kiuj eblas levi la gravecon de la familio. Sekve vi devas fieri pri via familia nomo malantaŭ kiu troviĝas tiom da gravaj personoj kaj atingoj. Por fortigi la ideologion gravas la rolo de kulturo, antaŭ ĉio lingva kulturo de literaturo, kiu je bela maniero parolas al ni pri la graveco kaj grandiozeco de nia grupa genio. Tiu prezentiĝas per la genieco de verkistoj sed ankaŭ en tio grave funkcias aliaj kulturspecoj kiel la muziko (generacia transdono de popolaj kantoj, moroj, ceremonioj...) arkitekturo ktp.

Kompreneble tio estas ankoraŭ pli grava kiam temas pri evoluo de grupidenteco en grandaj grupetoj, do je la nivelo de tutŝtata, nacia identeco, religia identeco ktp. Ĉi tie temas pri aparteno al grupoj en kiuj grandan plimulton de la grupanoj oni tute ne konas persone. Tial ni ne povas scii ĉu ni povas fidi al ili. Pro tio por tiaj identecoj la plej grava afero estas la edukado, ĉar ne ekzistas maniero ke individuo onuope konvinkiĝas kiel ĉiu sloveno ekzemple estas tre bona kaj preta helpi al ĉiu alia sloveno. Ĉi tie ludas la rolon nacia, aŭ religia eduko en institucioj, do en ŝtataj aŭ ekleziaj lernejoj. Lastatempe eĉ pli gravan rolon ol tiuj institucioj havas publikaj informmedioj.

Tial la ŝtatoj kaj eklezioj klopodegas varbi en siajn instituciojn kiel eble plej junajn infanojn por ke la geinstruistoj eduku ilin por aparteno al sia nacia aŭ religia komunajo. Por tio ili uzas la ideologiojn, do aron da ideoj per kiuj ili klopodas klarigi al la infanoj ke la celo de ilia vivo estas agadi por tiuj komunajoj kaj konduti laŭ iliaj reguloj.

La fundamento de ĉiu ideologio estas komunaj valoroj. Kiuj estas tiuj superaj valoroj por kiuj indas batali, kaj se la gvidantoj tion diras, eĉ oferi siajn vivojn? Kiuj estas valoroj kiujn sekvis niaj geavoj kaj iliaj gepatroj kaj kial nia popolo estas tiom grava? Inter tiuj valoroj certe enestas la homaj rajtoj, jure difinitaj de UNO kiel ekz. reciproka solidareco (se estos inundego, helpos nin la ŝtato, do aliaj apartenantoj al nia popolo), tiam diversaj homaj rajtoj (diference klarigataj en diversaj landoj) kiel la netuŝebleco de ŝtata teritorio, solidareco kun invalidoj, maljunuloj, rajto esti kuracataj kaj akiri sciojn por la vivo... Tie enestas ankaŭ tolero al kultura, lingva kaj religia diverseco, diverseco en lokaj, regionaj kaj naciaj ritualoj kaj moroj. Tial ni devas kompreni kiel defendon de niaj valoroj batalon por nia tradicio: ekzemple kiel sin vesti, kiuj estas niaj ceremonioj ekz. okaze de naskiĝo, geedziĝo kaj morto... Islamano iros batali, se iu malpermesos al virinoj surhavi certajn tradiciajn ŝalojn surkape, sloveno revolucios se la ŝtato malpermesos al li bapti la infanojn...

Sekve la identecon de granda grupo oni realigas per institucioj por edukado, kies fonto estas valoroj de la koncerna grupo. El la valoroj la edukistemo kreas ideologion kiun ĝi fundamentas en kulturo de la popolo, kutimoj kaj antaŭ ĉio historio de la grupo kaj ties legendoj.

La ideologio devas konvinki ĉiujn membrojn de la grupo (popolo), ke iliaj valoroj estas la plej gravaj kaj ke ilia popolo, eĉ se ne estas la plej bona, ĉiukaze estas la plej grava ĉar per tio oni fortigas la senton de graveco kaj memfido de ĉiu membro, la senton de kontento pro tio ke li vivas ĉi tie inter tiel gravaj homoj kun tiel grava historio kaj kulturo.

La ideologio estas, kiel ni scias, aro da provoj klarigi la sencon de la vivo kaj ofte ĝi baziĝas je malveroj kaj duonveroj. Ĉar post la dua mondmilito la politikistoj decidis forviŝi ekstremajn ideologiojn, okazis ke simple oni malaperigis la nocion pri ideologio, kaj tion blinde sekvis ankaŭ la sociaj sciencoj. Nuntempe oni konsideras la nocion ideologio nur ekstremisma ideologio kiel la nazia, faŝisma aŭ komunisma, ekzistas do tendenco ke en niaj »normalaj« landoj ideologio ne ekzistas aŭ ke oni devas kontraŭstari ĉiun ideologion. La vorto ideologio ricevis per si mem nur negativan konotacion. Pri tio ke pli poste en Jugoslavio oni evoluigis same negativajn naciajn ideologiojn, kiuj kondukis al same katastrofaj rezultoj (etnocado en Bosnio/Hercegovino ktp), oni ne diskutas, ke la religiaj ideologioj tre ofte estas kaŭzo de grandaj katastrofoj kaj kolizioj de popoloj kaj eĉ de la plej teruraj militoj – ankaŭ pri tio ni ne diskutas. Tial en Eŭropo validas la starpunkto ke ideologio estas io malbona kaj ke ĝi ne rajtas ekzisti. Ni estu ne-ideologia socio, socio sen ideologio. Sed tio estas grandega malvero.

La homo kiel socia estaĵo ne povas vivi sen ideologioj, kiuj estas fono de kredoj kaj konvinkoj pri tio ke estas nepre necese esti ano de iu grupo, popolo, religio, filozofia skolo, regiona aŭ vilaĝa komunikaĵo...

Necesas kompreni la kontraŭdiron inter ideologio kiel nepreco de la homa vivo kaj negativaj konsekvencoj de dogmista ideologio al iu grupo kaze de ekstremaj kaj danĝeraj cirkonstancoj. Se ni ne kredus ke nia popolo estas tre grava, ni ne povus longe vivi en ĝi, aliflanke se ni permesas ke oni eduku la popolanojn ke ilia popolo estas la plej grava kaj ke tio permesas al ili subjugi aŭ detruu aliajn popolojn, tiam nepras tian ideologion malebligi kaj batali kontraŭ gvidantaro kiu tian ideologion enkondukas en la ŝtatan edukon.

Por ke homo povu vivi kiel grupestaĵo, ne nepras esti ano de iu popolo. Sufiĉas ke li havas sian triban (ni pensu pri homoj kiuj ankoraŭ nuntempe vivas for en ĝangaloj, malproksime de

la longa brako de la ŝtato), lokan, familian kaj plurajn aliajn identecojn. Ni ĉiuj havas multajn kaj se malaperas iu el ili aŭ eĉ pluraj, restas daŭre multaj aliaj. Kaj tiel devas esti ĉar se ni havus nur unu grupidentecon (kiel ofte volas aserti ekstremaj naciistoj) kaj tiu malaperus (ekzemple se mian ŝtaton okupas alia popolo kaj proklamas mian nacian identecon neekzistanta), ni kiel sociaj estaĵoj sen grupapartenon ne povus vivi. Pro tio mi ne devis ĉesi vivi kiam mi perdis jugoslavian identecon (por ĝi oni edukis min en la lernejoj). Restis al mi multaj aliaj: la kroata, kiun mi havis paralele ankaŭ antaŭe, la zagreba loka, la kajkava regiona, esperantista (la tutan tempon mi estis ankaŭ esperantisto) kaj pli poste mi akiris pliajn novajn ĉar mi transloĝiĝis al Slovenio: la slovenan, la slovenstirian, la mariboran...).

Ne estas necese ke mi havu klasikan religian apartenon (ke mi apartenu al iu instituciigita religia komunaro), sufiĉas aparteni al certa vivfilozofio pri la senco de la homa vivo kaj ke mi havu multegajn diversajn amikajn grupojn. Oni ne povas diri ke iu ajn homo estas ateisto, do ke li kredas pri nenio. La homo kiel socia estaĵo ne povas vivi sen konvinkiĝo, kiu donas al li la vivsencon kaj tenas lin interne de iu moralo sed ne estas nepre necese ke tiu kredo (konvinkiĝo) estas rezulto de la eduko ene de iu religia institucio.

Zlatko Tišljar

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 31-an de majo 2018

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Ulrich Brandenburg, Petro Zilvar, Marian Vochin, Gazetaraj Komunikoj de UEA, Zlatko Tišljar

Kontakto: ztisljar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

